

Svisa Esperanto-Societo informas

1999 numero 2a: aprilo / majo

Redakcio:

Claude GACOND, Poŝtako 5031, CH-2305 La Chaux-de-Fonds 5

☎ ĉe C.D.E.L.I.: 032 967 68 55, hejme: 032 926 52 32

Fakso: ĉe CDELI: 032 967 68 29; indiki: por Claude Gacond

Vivo de SES

SES-Tagoj en Zürich

15/16 majo 1999

Akazienhof, Akazienstrasse 6

Per aparta cirkulero ĉiuj SES-anoj kaj verŝajne aliaj esperantistoj estis detalege informataj pri tiu renkontiĝo, kies kadra temo estos *Eŭropa identeco, ideologio kaj lingvo*. Kiuj ne ricevis la menciitan informilon povas ĝin peti al Esperanto-Societo Zürich, poŝtako 858, 8034 Zürich.

En la programo de tiu renkonto okazos speciala rendezuo por aktivuloj, la ĝenerala asembleo de SES, distraj kaj kulturaj programeroj. La gast-preleganto estos

Zlatko Tišlar, aŭtoro de la libreto *Eŭropa ideologio*. Paralele al la ĉefprelego okazos paroliga kurso por komencantoj.

Tiu renkonto disvolviĝos en la novaj kunvenejo kaj librovendejo de la zurika esperanto-societo en Akazienstrasse 6.

Jen resume la ĉefaj momentoj de tiu aranĝo

Sabaton 15an de majo :

10.00-11.00 Libroservo+kafejo.

11.00-12.30 Rendezuo por aktivuloj. Raportos **Sonja Brun** : *Ne forgesu la angulpecojn, kiam vi organizas standon*, **Patrick Rentsch** : *Lerni esperanton per interreto*, **Marion Bélisle** : *Se vi varbas, atentu pri...*, **François Randin** : *8 tagoj en Tanzania Esperantio*.

12.30-14.00 Tagmanĝo.

14.00-16.00 Ĝenerala kunveno de SES kun jena tagordo :

1. Komunikoj de la prezidanto.
2. Elekto de la voĉnombrantoj.

3. Protokolo de la lasta jarkunveno (21.03.98) publikigita en *SESi* 1998-3.

4. Agadraporto 98 kaj agadplano 99.

5. Jarkalkulo kaj bilanco 98, Raporto de la kaskontrolantoj, buĝeto 99.

6. Diversaĵoj.

Proponoj por la ĝenerala asembleo devas atingi la prezidanton ĝis fine de aprilo. Adreso : Bruno Graf, Jurastr. 23, 3063 Ittigen.

16.00-17.00 Libroservo+kafejo.

17.00-19.00 Eŭropa identeco, ideologio kaj lingvo kun Zlatko Tišlar de la Asocio por Eŭropa Konscio en Maribor, Slovenio.

Paralela kurso por komencantoj

19.00-20.30 Fondua vespermanĝo

20.00-00.00 Bunta distra kaj kultura vesperprogramo : Pupteatro kun Linda kaj Dietrich Weidmann, kubanaj dancoj kun Nelida Weidmann, nostalgiaj fotoj kun Anita Altherr, ktp.

Dimanĉon 16an de majo :

10.00-13.00 Literatura antaŭtagmeza bufedo kun la poeto Jan Stanislaw Skorupski.

13.00-15.00 Eŭropa identeco, ideologio kaj lingvo kun Zlatko Tišlar.

Paralela kurso pro komencantoj

15.00-16.00 Libroservo+kafejo.

Jarraporto 1998

Post la lasta Ĝenerala Kunveno la longjara kasisto Ernst Von May eliris la Estraron. Kaj kiel antaŭvidite anstataŭas lin Barbara Pochanke. Nun la Estraro konsistas el 6 membroj :

Bruno Graf, prezidanto

Perla Martinelli, vicprezidanto

Anĝelo Mellini, sekretario

Barbara Pochanke, kasisto

Nicole Margot kaj Nicole Bérout-Focke.

La Estraron bone subtenas la laborgrupo pri varbado kaj jenaj komisiitoj : Claude Gacond, la redaktoro de *SES informas* kaj arkivisto de SES ; Mireille Grosjean, komitatano de SES ĉe UEA, Sonja Brun, ĉefdelegito de UEA en Svislando.

Kunsidoj kaj kunvenoj

La Estraro kunsidis 3-foje la sabaton en Bern, la laborgrupo pri varbado 2-foje. Raportoj pri tiuj kunsidoj aperis en *SESi*. Ankaŭ notindaj estas jenaj aliaj kunvenoj :

21/22.03.98 : En Basel ege bone vizitita kaj organizita Ĝenerala Kunveno de SES, kunligita al trilandanda renkontiĝo kaj kultura semajnfino.

27/28.04.98 : En Genève eliteca renkontiĝo SES-UEA kaj seminario UEA-UN pri la lingva

dimensio de la Homaj Rajtoj organizitaj de Andy Künzli kaj de lokaj SES-anoj.

12/13.09.98 : En Cully regiona kultura semajnfino kun prelego de Claude Gacond pri la epokfara revuo *Literatura Mondo*. Riĉiga temo.

21.11.98 : En Bern merkatika tago kun Marco Picasso. Interesa, sed ne sufiĉe vizitita kunveno.

Informado

Nia bulteno *SES informas* aperis 5-foje. Ĝi respegulas la esperantovivon en Svislando.

La gazetara servo bedaŭrinde vakas, ĉar Andy Künzli ĉesis verki gazetarajn komunikojn. Tamen kontentige funkcias la kolektado de gazetartikoloj pere de la lokaj grupoj kaj de kunlabor-emaj membroj, kio estas necesa, ĉar ni ne plu abonas al Argus.

Ni komencis kontakti la buroojn de la svisa Unesko-Komisiono kaj de la fondumo Lingvoj kaj Kulturoj en Comano. Temas pri publikrilataj klopodoj.

La Estraro kreis novajn leterkapon kaj logon helpe de Rolf Ernst. Tio kontribuas al bonaj impresoj kaj prestiĝo favore al nia movado.

Varbado

La kreo de tute nova varbilo montriĝis pli komplika ol atendite. Tial ni mendis varbilojn

germanlingvajn ĉe Germana Esperanto-Asocio kaj uzis la franc lingvajn de JES por la momenta bezono. Tamen ni sukcesis ellabori kaj presigi novan informilon de SES kaj kontakt-kartetojn, kiuj uziĝas kiel vizit-kartoj. Rolf Ernst garfikumis ilin.

La laborgrupo pri varbado pretigis koncepton por surstrata enketado dum la agotagoj oktobraj 1998. La lokaj grupoj mirinde bone partoprenis la agadon. Estis enketitaj 700 personoj, samproporcie viroj kaj virinoj, junuloj, plenkreskuloj kaj emeritoj. Frapas, ke nur kvinono de la junularo scias pri esperanto kompare al duono de la plenkreskula generacio. Vera defio por SES kaj JES.

La rezulto de la membrovarbado estas bona, ĉar aliĝis 17 personoj ; sed ni perdis 10 membrojn pro ekŝiĝo kaj morto. La bilanco estas tamen pozitiva kaj ni esperas stabiligi nian membronombron.

La Estraro dankas al ĉiuj membroj, kiuj helpis atingi tiun rimarkindan rezulton.

La prezidanto : Bruno Graf

JARKALKULO, BILANCO 1998 KAJ BUGETO 1999 DE SES

<u>JARKALKULO</u>	<u>BUGETO 98</u>	<u>KALKULO 98</u>	<u>BUGETO 99</u>
Membrokotizoj	7'500,-	7'568,-	7'500,-
Abonoj (sen membreco)	400,-	170,-	200,-
Donacoj	1'500,-	1'160,-	1'200,-
Donacoj Agado 2003, enspez.	1'500,-	1'631,-	1'500,-
Interzonoj CS-ZH, GEP 97, malnetaj	<u>1'500,-</u>	<u>910,80</u>	<u>900,-</u>
Enspeza sumo	12'400,-	11'439,80	11'300,-
 INFORMADO, PUBLIKAJ RILATOJ			
Informado, Varbado	5'000,-	3'029,65	4'000,-
Omagoj, Laborrimedoj	50,-	153,-	50,-
Argus	260,-	250,-	----
Subvencoj, premioj por ideoj,projektoj	1'200,-	80,-	1'000,-
Agado 2003, elspezoj	<u>200,-</u>	<u>230,-</u>	<u>200,-</u>
	6'710,-	3'742,65	5'250,-
 SERVOJ			
Literatura Foiro, Heroldo	4'500,-	9'600,-*	-----*
SES Informas	2'000,-	1'724,75	2'000,-
Kunvenoj(GK)	<u>800,-</u>	<u>600,-</u>	<u>600,-</u>
	7'300,-	11'924,75	2'600,-
 ADMINISTRADO			
UEA-kotizo	150,-	289,10	250,-
Administrataj kostoj	2'400,-	2'851,75	2'800,-
Bankspezoj, Diversaĵoj	<u>300,-</u>	<u>169,95</u>	<u>200,-</u>
	2'850,-	3'310,80	3'250,-
 ELSPEZA SUMO	 16'860,-	 18'978,20	 11'100,-
 GAJNO / MALGAJNO	 -4'460,-	 -7'538,40	 +200,-

KAPITALO SES (CS-ZH, CG, UBS, KCE)		<u>AKTIVOJ</u>	<u>PASIVOJ</u>
GEP, konto 079 (mankas finkalkulo 98)			
UBS KCE favore SES (mankas finkalkulo 98)		19'614,35	
Inventaro		1,-	
CS-ZH, zinsstuf. sparkonto		29'531,15	
CS-ZH, kuranta konto		3'144,95	
CS-ZH, fonduso Agado 2003		8'702,25	
Varbsumo disponebla ce CG		127,20	
CS-ZH (sen GEP 98) ant. imp. bonhavo ce ESV		<u>225,90</u>	
Transaj eroj, aktivaj kaj pasivaj		61'346,80	325,-
Kapitalo je 01.01.98	68'560,20	_____	<u>61'021,80</u>
minus Malgajno	<u>-7'538,40</u>		
Kapitalo je 31.12.98	61'021,80	61'346,80	61'346,80

REZERVA KAPITALO (CS-Winterthur)

CS-WI, sparkonto		10'242,30	
CS-WI, ant. imp. bonhavo ce ESV		46,90	
Rezerva kapitalo je 01.01.98	11'158,20		
plus interezoj malnetaj	+134,-		
minus favore AG 2003+ girspezoj	<u>-1'003,-</u>		
Rezerva kapitalo je 31.12.98	10'289,20	_____	<u>10'289,20</u>
		10'289,20	10'289,20

31.12.98, B. Pochanke, kasistino

* Pago por la jaroj 1998, 1999 de Literatura Foiro.

SVISA ESPERANTO - SOCIETO

Raporto de la kas-kontrolantoj

La subskribintoj Dieter Rooke, Oensingen kaj Paul Scherer, Emmenbrücke, kunsidis la 28-an de januaro 99 en la hejmo de la kasistino, Barbara Pochanke, Wil, por kontroladi la librotenedon kaj la ĉi-rilatajn dokumentojn de la jarkalkulo 1998 de Svisa Esperanto-Societo. Subtenis nin Ernst von May, kiu kasistis ĝis fine de marto 1998.

Ni certigis nin pri la ĝusta transskribo de la saldoj el la antaŭa jarkalkulo, kontrolis la laŭordan enskribon de en- kaj elspezoj en 1998 surbaze de la ekzistantaj pruviloj kaj komparis la unuopajn kontosaldojn.

Anstataŭ la buĝetita malgajno de fr. 4 460.-, aperas pli granda, nome fr. 7 538.40. Ĉi-tiu plialtiĝo de fr. 3 078.40 estas nur ŝajna, ĉar ĝi ĉefe kaŭzas el la tro frua pago de la abonoj „Literatura Foiro / Heroldo“ por 1999. Tial ja la kapitalo malaltiĝis de fr. 68 560.20 al fr. 61 021.80.

Al SES apartenas ankaŭ tiel nomata Rezerva Kapitalo. La 31-an de dec. 1998 ĝi sumis je fr. 10 289.20, kio estas fr. 869.- malpli ol antaŭ unu jaro.

Ni, la kas-kontrolantoj povis kun ĝojo konstati, ke la librotenedo estas modele farita. Tial ni proponas al la Ĝenerala Kunveno, aprobi la jarkalkulon kaj la bilancon 1998 kaj malsarĝi la estraron. Al la kasistino kaj al ŝia antaŭulo kaj helpinto ni sincere dankas pro la zorgeme plenumita tasko dum la tuta jaro.

Wil, la 28-an de januaro 1999

La kas-kontrolantoj:

P. Scherer

Paul Scherer

D. Rooke

Dieter Rooke

Agadplano 1999

Ni procedas laŭ nia celaro kaj daŭrigas niajn klopodojn.

Informado kaj varbado

La Estraro kaj la laborgrupo pri varbado planas daŭrajn plibonigojn. Denove ni dissendadas varbleterojn por gajni novajn membrojn al SES aŭ abonantojn al *SESi*. Fakte 250 membroj de lokaj grupoj ne anas al SES, dum SES nombras nur 160 membrojn. Ju pli SES aktivos, des pli eblos konvinki interesulojn pri ĝia specifa rolo sur la nacia tavolo.

Kunlaboro kun lokaj kaj fakaj societoj

De tempo al tempo la Estraro sendas cirkulerojn al la lokaj grupoj por peti aŭ proponi helpon en difinitaj projektoj. Bedaŭrinde ne ankoraŭ eblis trovi agadprogramon kun ILEI kaj JES manke de kunlaborantoj.

Gazetara servo kaj publikaj rilatoj

Perantoj vakas kaj ni serĉas fakulojn. Tamen Tazio Carlevaro korespondas kun regionaj gazetoj. Ni ankaŭ esploras eblecojn por la publikaj rilatoj.

Kunvenoj kaj aranĝoj

06.03.1999 : Ni anoncis laborkunvenon en Bern por la analizo

de la lingva situacio en Svislando kaj por la ellaboro de strategiaj rekomendoj.

15.05.1999 : Ĝenerala Kunveno en Zürich kun rendezuo por aktivuloj kaj kultura parto.

En oktobro okazos agotagoj preparitaj de la laborgrupo por varbado.

La ĉefa tasko de SES estas la informado. Ni devus fari multe pli, sed mankas kapablaj aktivuloj. Kiu ne havas tempon por transpreni funkcion aŭ taskon, tiu subtenu nin finance.

SES nove prezentita

SES havas novan aperbildon kun aspekto moderna kaj alloga. La Estraro kaj la laborgrupo pri varbado konceptis novajn leterkapon, SES-faldfolion kaj vizit-karton. Rolf Ernst grafikumis tiujn presajojn. Ekstere ni komencas esti pretaj por la jaro 2000.

Nia logo estas dukolora blua-verda terglobo, en kiu diveneblas la mallongigo SES. Leterkapo, faldfolio kaj vizitkarto portas la samajn kolorojn kaj signeton.

La faldfolio servas por prezenti nin al eksteruloj, por informi koncize pri niaj servoj kaj taskoj, por interesi homojn kaj varbi membrojn. La teksto estas du-lingva, germana kaj franca. Ĝi komenciĝas per :

Grüezi – Wir haben eine Vision.

Bonjour – Nous vivons une utopie.

La vizitkarto estas presita en la germana lingvo, ĝi surhavas sloganon, niajn adreson, telefonon kaj ret-indikon. La laborgrupo testis sloganon kaj elektis finfine jenan tekston :

Unerhört, wie leicht man sich weltweit verständigt und einander näher kommt.

Faldfolio kaj vizitkarto volas esti disdonitaj. Ni rekomendas uzi la vizitkarton lige kun persona kontakto, kiam vi renkontas konatojn, interesatojn en restoracio, trajno, survoje, ktp., sed ne kiel postlasaĵon. Vi povas stampi dorsflanke vian personan aŭ grupan adreson.

Venu al la rendezuo de aktivuloj kaj al la Ĝenerala Kunveno, kie ni prezentos tiujn informilojn. Aŭ vi povas mendi faldfolion kaj vizitkarton ĉe SES, Jurastrase 23, 3063 Ittigen. ☎ (031) 921 44 59.

La laborgrupo pri varbado momente rezignas ankaŭ presigi franclingvan vizitkarton pro la kostoj kaj la malgranda bezono. Sed ni ofertas al romandoj kaj tiĉinanoj memfaritan vizitkarton kun slogano kaj kun via propra nomo. François Randin kreis tian kaj pretas fari similajn por samideanoj. SES transprenos la elspezojn. Se vi estas interesata, bonvolu kontakti lin telefone (021) 647 29 17 aŭ (Natel) 792

108 950, aŭ skribe : Vallombreuse 14, 1004 Lausanne.

La Estraro informas

En februaro kunsidis unue la laborgrupo pri varbado, due la Estraro. Ni resumas sciindajn tagorderojn.

La laborgrupo decidis projekton kaj preparas koncepton por la **agotagoj 99**. Ĝi intencas atentigi pri esperanto per kreota afiŝo kaj per libroj en montrofenestroj de magazenoj aŭ en foiroj. Membroj esploras pliajn ideojn, nome pri partopreno en la junulara kongreso Spiert Aviert, pri kreo de vidbendo pri esperanto por lernejoj, pri rekomendo de kurso per komputilo aŭ per interreto.

La Estraro invitas la lokajn grupojn ĉeesti en la **svisa lern-festivalo**, kiu okazos de la 3a ĝis la 9a de junio en ĉiuj regionoj de la lando planita de la Schweizerische Vereinigung für Erwachsenenbildung. Estus ege bona ebleco por prezenti esperanton aŭ por organizi kurson kadre de tiu evento.

La januare dissendita **varbletero** havis rezulton: unu aliĝis kiel membro, 7 personoj abonis la bultenon *SES informas*. Lastjare ni gajnis 17 novajn membrojn kaj perdis 10 pro ekziĝo kaj morto.

La prezidanto vizitis la buroon de la **nacia Unesko-Komisiono**

kaj transdonis la libron de UEA : *Al lingva demokratio* kun letero al la membroj. La sekretarioj pri-zorgos la disdonon per la interna kanalo.

La **fondumo Lingvoj kaj Kulturo** danke konfirmis nian aliĝon kaj reduktis la kotizon de 500 al 200 frankoj, konsiderante la komun-utilan karakteron de nia societo.

Mankis esperanta telefonindiko en la urbo Bern. Tial Bruno Graf mendis ĉe Swisscom sub Bern aldonan enskribon por sia telefon-numero kun la indiko : **Esperanto Information Schweiz**.

La prezidanto : Bruno Graf

Donacoj

La kasisto Barbara Pochanke dankas pro la sekvaj donacoj :

Al konto 33 SES : Nicoletta Beretta : 25.- ; Ernst Glättli : 5.- ; Moreno Graneroli : 25 ; Renate Heer : 30.- ; Jean-Jacques Lavanchy : 65.- ; Nicole Margot : 70.- ; Amalie Veith : 30 ; Armin Weidmann : 15.-

Al konto 34 : « Agado 2003 » : Georgette Gausson : 40.-.

Komento pri la laborkunveno

de la 6a de marto en Bern

La 6an de marto la SES-prezidanto Bruno Graf kunvokis labor-grupon en Bern por diskuti pri la aktuala situacio de la svisa esperanto-komunumo kaj pri eblaj strategioj por konduki ĝin el la nuna krizo. Sekve al lia invito venis partoprenantoj el ĉiuj lingvaj regionoj, el la itala ĉeestis Tazio Carlevaro, Perla Martinelli kaj Giorgio Silfer, el la franca Christiane Sixtus Pot, Anita Altherr kaj Claude Gacond, kaj el la alemana Verena Chaves-Walder, Sonja Brun, Paul Scherer, Andy Künzli kaj Ernst Glättli. Tiu lasta reprezentis la svisajn esperanto—fervojistojn.

El la vidpunkto de la neesperantisto Hans Dubois, Carlevaro, per eseo titolita *Ĉu Esperanto post-vivos la jaron 2045 ?* traktis la nunan lingvan situacion en Svislando kaj imprese ilustris per statistikaj ciferoj la progresantan enpenetron de la usonangla lingvo ĉie en la moderna vivo de Svislando. Bedaŭrinde, la bildo de esperanto ĉe la publiko estas malbona. Kulpas la parte eksmodaj mitoj de la esperantistoj, kiujn necesus modifi aŭ eĉ forigi por esti pli forte akceptata. El Tiĉino

li povis kunporti nur malbonajn novaĵojn, nome la anoncon pri la antaŭvidita likvido de Tiĉina Esperanto-Ligo (TEL) kaj de Grupo Esperantista de Lokarno (GRESLO). Ĉi tiuj strukturoj lamas jam delonge kaj post la forpaso de pluraj aktivuloj jam preskaŭ mortis. Simila evoluo cetere minacas aliajn lokajn esperanto-grupojn en Svislando. Laste, Carlevaro atentigis pri la ĵus aperinta "Bibliografio di Ido", kiun li preparis dum jaroj kunlabore kun Reinhard Haupenthal. Per tio li klare akcentis siajn agadinteresojn, kiuj estas planlingvistiko kaj la historio de planlingvoj, antaŭ ĉio la lingvo ido.

La zorge preparita prezento de nia eminenta tiĉina samideano, kiu liveris plenplenen da motivoj por pludiskutadi, parte estis rebatita de Perla Martinelli. Kiel adepto de la raŭmismo kaj subtenata de Giorgio Silfer, la vicprezidentino de SES kritikis la pesimismon de Carlevaro kaj alvokis la esperantistajn organizojn pli ofte kapti la okazojn reale vivi esperanton kaj flegadi la rektajn kontaktojn interregionajn. Claude Gacond aldonis, ke per la okazigo de kulturaj semajnfinoj en la esperanto-vakuaj regionoj de Svislando kiel Friburgo, Valezo kaj baldaŭ ankaŭ Tiĉino, oni povus eventuale naski kaj vivigi novajn esperanto-ĉelojn.

Posttagmeze Bruno Graf celis doni bazon por estonta konstruiva analizo de la situacio de Svisa Esperanto-Societo kaj de la esperanto-movado en Svislando kaj evoluigis eblan strategion por majstri la nuntempan krizon. En tio li uzis sugestojn, kriteriojn kaj mezurilojn de Universala Esperanto-Asocio kaj la spertojn de la moderna merkatico, precipe usondevena, kiel malkaŝis lia uzo de diversaj anglaj fak-jargonaĵoj, por kiuj mankis esperanta kongruo.

Ĉar la preleg-kontribuoj, kiuj en si mem ne prezentis esence novajn analizojn kaj konkludojn, daŭris iom tro longe, restis malmulte da tempo por serioze diskuti la diversajn facetojn de la laborkunvena temo. Anstataŭe, tro dominis la rebatetoj, konstatoj kaj la komentoj iom tro subjektivaj. Tamen interalie estis farita ankaŭ la observo, ke la nunan krizon de Svisa Esperanto-Societo kaj de lokaj esperanto-grupoj oni devus vidi en la kunteksto de la ĝenerala krizo de kulturaj movadoj fone de pli malfacila ekonomia situacio kaj vaste pesimisma etoso en Svislando kaj en la mondo.

Ĉu do eblos "vendi" esperanton laŭ "modernaj, ĝenerale agnoskitaj" merkaticaj metodoj, kiel asertas Graf, restas tamen dubinde. Esperanto kaj la esperanto-kulturo ludas esence alian rolon kaj manifestiĝas laŭ alia maniero

ol la angla lingvomondo. Tion jam sufiĉe ofte kaj trafe komprenigis la raŭmistoj. Ni esperantistoj prefere distancigu de la eterna traŭmato ĉiam devi kompari kaj mezuri esperanton kun la angla lingvo. Laŭ mi, Carlevaro tute pravas, kiam li postulas la forlason de la tradiciaj praelismaj mitoj kaj ilian anstataŭigon per realaj argumentoj pli taŭgaj por la nuna epoko.

Mi persone kredas, ke la “vendo”, propagando kaj popularigo de esperanto devus prepari sin kaj efektiviĝi surbaze de la sana miksaĵo de pluraj, tradiciaj kaj novtipaj konceptoj, kiuj povas enhavi erojn el praelismo, homaranismo-esperantismo, sennacismo kaj raŭmismo. Gravas, ke ankaŭ la esperanto-movado adaptigu al la ŝanĝigantaj kondiĉoj de la koncerna epoko, sen perdi la proprajn valorojn.

Laŭ tiu koncepto, la poresperanta propagando do ne plu koncentriĝus ĉefe sur la lingvo kaj movado ekskluzive laŭ la Fundamento kaj la “Verda Biblio”. La atento direktus sin pli ofte al demandoj de kulturo kaj (intergenta) konduto, lingvaj kaj homaj rajtoj, paco inter etnoj kaj religioj, neŭtraleco, ktp. Tio ne ekskludas la rajton atentigi pri esperanto kiel unika lingva kaj kultura eksperimento aŭ fenomeno. Per aliaj vortoj : ne plu esperanto kiel

lingvo starus en la centro de la propagando, sed pli forte ĝia kunteksto perebla per la esperantismo en ĝia pli vasta kompreno.

Lige kun tiu strategio ŝanĝiĝus ankaŭ la percepto de la celpublikoj : Dum unuflanke akceliĝus la faka trejnado de la propraj aktivuloj, aliflanke efektiviĝus temspecifaj aranĝoj por la interesata “ekstera publiko”, gvidataj de kompetentaj esperanto-funkciuloj. Kiu aldone deziras lerni esperanton, tiu ricevu la okazon por tio. Ĉiukaze, la kondiĉo lerni esperanton por okupiĝi pri ĝi kaj la esperantismo, kiel tio okazis ĝis nun do forfalus. Ne la “hazarda” amaspubliko, kiu interesiĝas ekzemple pri futbalo aŭ komputiko, devus esti gajnita por esperanto per usonecaj merkatakaj metodoj, sed unuavice la publikoj sentemaj kaj responsaj pri kulturaj, lingvaj, sociaj, edukaj, klerigaj kaj politikaj aferoj kaj dezirantaj pli individuan kreadon de sia libertempo kaj eventuale profesia vivo estus alparolataj. Similan strategion aplikas ekzemple la novtipaj marketingistoj en la interreto, kie la amascelpubliko perdas kaj la individuaj klientoj aŭ celgrupoj gajnas pli grandan signifon.

Volenevole, la esperantistoj devas modifi sian tradician varbakaj informstrategion, se ili, ilia lingvo kaj ilia kulturo deziras

dece pluvivi sub la kondiĉoj de la 21a jarcento. Ŝajnas al mi, ke pri tiu punkto regas pli malpli unu-animeco. La demando estas nur kia strategio estas la plej taŭga.

Andy Künzli

Redaktaj limdatoj

Por *SES informas 1999-3* (junio + julio + aŭgusto) la redakta limdato estos la 20an de majo.

Por *SES informas 1999-4* (septembro + oktobro): 20an de aŭgusto.

Por *SES informas 1999-5* (novembro + decembro): 20an de oktobro.

C.D.E.L.I

Biblioteko de la Urbo, Progrès 33,
2305 La Chaux-de-Fonds. ☎ : 032 967
68 55. Fakso : 032 967 68 29.

Ni rememorigas, ke la dokumentaro de CDELI rezultas grandparte el donacoj. Tiurilate ni menciui, ke Claude kaj Nicole Piron, kiuj transloĝiĝos al Gland, direktis al CDELI multajn librojn, broŝurojn, revu-kolektojn, dokumentojn kaj korespondaĵojn, kiujn ili ne intencis kunpreni en sian novan loĝejon. Tiel la kolektoj de CDELI riĉiĝis je 110 novaj libroj katalogitaj sub la

siglo ESP, je 141 duoblaĵoj registritaj sub ESP-b, 73 trioblaĵoj registritaj sub ESP-P. Tiu ĉi fako konsistigas la interbibliotekan pruntoservon. Kaj 267 libroj, kiujn CDELI jam posedis tri-ekzemplere venis riĉigi la katalogon de la brokanta kaj interŝanĝa libro-servo, per kiu CDELI akiras financajn rimedojn favore al la aĉeto de nericevitaj dokumentoj. Revu-kolektoj venis kompletigi tiujn de CDELI kaj multaj arkivotaj korespondaĵoj certe altiros la atenton de la CDELI-vizitantoj per la riĉeco de siaj temoj.

Ni instigu aliajn transloĝiĝontojn ankaŭ nenion eljeti, sen unue ek-rilati kun CDELI, kies kolektoj estas ĉefe la respiegulo de la donacemo de la svisa esperantistaro.

Kiel ĉiu povas imagi, la ordigado de la ricevitaĵoj kaŭzas ĉiam grandan laboron, kiun nelacigeble plenumas Claude kaj Andrée Gacond kaj Cosette Sandoz, kaj ankaŭ de tempo al tempo kunlaboremaj feriantoj. Ambaŭ grupoj da regulaj kunlaborantoj kaj da helpemaj feriantoj volonte akceptas novajn bonvolemulojn. Abundas plenumebaj taskoj, kiuj povas efektiviĝi surloke aŭ eĉ hejme.

K.C.E.

Kultura Centro Esperantista

Strato Postiers 27, Poŝtfako 311, 2301
La Chau-de-Fonds. Ø kaj fakso : (032)
926 74 07.

La asembleo de KCE kunveninta la 30an de januaro decidis ĉesigi la eldonon de propra monata cirkulero kaj aperigi siajn informojn en *Heroldo de Esperanto* kadre de aparta rubriko. Tiel ne nur la apogantoj legos pri la okazontaĵoj, sed ankaŭ ĉiuj abonantoj de la gazeto.

Aprila monat-fino : 24/25 : La bona lingvo. Renkonto kun Claude Piron.

S.A.E.F.

Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj
Gertrud Eggenberger, Wurmbühlstr. 10
8405 Winterthur Ø 052 233 47 64

La ĝenerala jarkunveno de SAEF okazis la 27an de marto en la centra stacidomo de Olten. Laŭ la jarraporto de la estraro aperinta en la marta numero de *Svisa Fervojisto*, ni estas informitaj per la partopreno de la SAEFprezidantino en la Delegitara Kunsido de la Unuiĝo Arta kaj Intelekta de Svisaj Fervojistoj, ke ĉiuj fervojistaj asocioj ligitaj al tiu unuiĝo konas la saman zorgon, kiu estas la manko de junaj membroj. Tio

estas ĝenerala kultura fenomeno en Svislando.

En 1998 SAEF perdis kvar longjarajn membrojn, sed feliĉe aliĝis kvar novaj, tiel la membro-nombro restis la sama kiel fine de 1997, nome 110.

Unu el la servoj de SAEF estas Gaja Esperanto-Rondo-Instruit-eca, kiu donas la eblon praktike apliki esperanton en ĝoja etoso. La venonta 32a GERI-kunveno okazos la sabaton 24an de aprilo ekde la 10h15 ĝis la 16h00 en la instrukcia ĉambro n-ro 203 en la 4a etaĝo de la nova oficeja konstruaĵo orienta en la stacidomo de Luzern. Ankaŭ ne-SAEF-anoj estas bonvenaj.

U.E.A.

Universala Esperanto-Asocio
Ĉefelegito kaj peranto por la
Universala Kongreso : Sonja Brun,
Waldegstr. 28, 6343 Rotkreuz. Ø 041
790 46 40.

Por esti informata pri tio, kion UEA faras por esperanto kaj proponas al siaj membroj, legu la revuon *Esperanto*. Provekmpleroj haveblas ĉe la ĉefdelegito.

Dankon al ĉiuj, kiuj akurate pagis sian UEA-membro-kotizon por la jaro 1999. Sen la renovigo de la abono por *Esperanto* la marta numero estis la lasta, kiun vi ricevis. La jarlibro aperos en la somero.

Ĉiuj aliĝintoj al la **Universala Kongreso en Berlin** devus esti ricevintaj sian kongresnumeron kaj la *Duan Bultenon*, kiu estas tre belaspekta kaj proponas abundan programon, ne nur por la kongreso mem, sed ankaŭ por tri antaŭkongresoj kaj du post-kongresoj. La multnombraj eblecoj por ekskursoj estas ege allogaj, la kongresa temo *Tutmond-iĝo - ĉu ŝancoj por paco?* tre aktuala. Estas ankoraŭ tempo por aliĝi!

Pro la ĝis nun modesta nombro de la svisaj partoprenontoj kaj variaj vojaĝeblecoj la komuna vojaĝo ne estas planita. Por pluaj informoj kontaktu la ĉefdelegiton, kie ankaŭ kongresaj glumarkoj estas haveblaj po CHF 3.- kontraŭ folio de 24 pecoj.

Movada vivo

Ni povas anonci kaj raportoj nur laŭ la informoj, kiujn ni ricevadas. Dezirindus, ke post ĉiu esperanto-kunveno responsulo mallonge raportu al la redaktoro de *Svisa Esperanto-Societo informas* pri la okazintaĵoj kaj samtempe anoncu al ni la datojn kaj programon de la venontaj aranĝoj.

Basel

Esperanto-Societo Basel

PF 103, 4005 BASEL. ☎ :0049 76 214
57 12. Kunvenoj: 20.00 en Altersheim,
Neubad.

Genève

Esperanto-Grupo "La Stelo"

PF 188, 1211 GENÈVE 20. ☎: 022 740
04 45.

Kunvenoj:

Aprilo 6an : 20h00 – 22h00 en la restoracio Les Cheminots, 7, rue des Gares, Genève. Vespermanĝo ekde la 19h00.

Aprilo 27an : ekde la 16h00 - 18h00 : studrondo ĉe Anita Altherr, rue de Bernex 340, Bernex.

Novajoj : La ĝenerala kunveno, kiu okazis la 2an de marto, grupigis 16 personojn, kiuj rifuzis malfondi la societon, eĉ se montriĝis, ke neniu pretas konsistigi novan komitaton. Tial la aktiveco plu daŭros sen komitato. S-ro Rawyler transprenis la redaktadon de la informilo *Brasikfolio*, la agadraporto de Arlette Di Vetta estis akceptita, same kiel la kontoj, Anita Altherr respondos al la korespondaĵoj, kiam ŝi restados en Svislando. Kaj jen, kuraĝe antaŭen al la jaro 2000 !

Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo

PF 389, 1009 PULLY. ☎ :021 729 58
02. E-mail: lausanne . ch @ esperanto. nu.
Homepage: http://www . esperanto. ch.

Monataj kunvenoj: 20h30 en la Stacidomo, 1-a etaĝo. **Diskuta rondo:** ĉiumonate je la tria lundo en hotelo Continental inter la 18h00 kaj la 20h00.

Luzern

Lucerna Esperanto-Societo

Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke.
☎ :041 280 46 12.

Kunvenoj: la duan jaŭdon de la monato: 19h30: paroliga leciono; 20h00: babilado; 20h20: interŝanĝo de informoj; ĉirkaŭ 20h45: komenciĝas la anoncita parolado. Kunveno: Hotelo-restoracio Emmenbaum, Gerliswilstr. 8, 6020 Emmenbrücke, atingebla per trolebuso 2 de Lucerno kaj de la regiona trajno ĝis haltejo-stacidomo Emmenbrücke (ĉ. 100 m).

Paroligaj kunvenoj kun Franz Brügger la unuan merkredon de la monato: 14h00-16h00 en la restoracio Big Ben, Winkelriedstr. 39.

Neŭŝatela Kantono

Studo de esperanto en

La Chaux-de-Fonds

En la salono de C.D.E.L.I., Biblioteko, pordo nord-orienta. ☎ : 032 967 68 55.

Venontaj studvesperoj de la 19h45 ĝis la 21h45 :

Aprilo 27an kaj majo 26an.

En februaro ni renkontiĝis kun François Degoul, kiu raportis pri sia religia evoluo el katolikismo tradiciema al eŭkumenismo homaranisma. Aliaj vesperoj dediĉiĝis al legado de beletraĵ fragmentoj kaj al klarigoj de ludoj.

Le Locle

Esperanto-kurso en la duagrada lernejo

Dum sia prilingva instruado Mireille Grosjean kelkfoje mencias la kvalitojn de esperanto. Ĉar la gelemantoj penas studi la germanan kaj la anglan, ili entuziasmiĝis pri unu el ŝiaj demonstroj pri la facileco kaj reguleco de esperanto. Ĉiuj lernantoj deziris komenci la studadon de tiu lingvo! Sed pripensa paŭzo estis necesa. Post la decembra feriado restis 7 interesatoj, kiuj vere komencis malkovri esperanton je la 6a de februaro. La kurso daŭros ĝis la fino de junio. Ĝi disvolviĝas libervole en la mezlernejo de Le Locle ĉiun vendredon de la 15h45 ĝis la 16h40.

5 knabinoj kaj 2 knaboj kvindekjaraj tiel malkovras esperanton kun giganta ĝojo. Ili rapide komprenas, eltrovas, deduktas kaj miras pri la reguleco de la lingvo. Ili jam konatiĝis kun la finaĵoj, la marko -n, la verbaj tempoj. Tamen restas la tabelvortoj, la

sufiksoj -ig- kaj -iĝ- kaj la participoj... Kuraĝo antaŭen !

Se kontaktoj povos okazi kun JES-anoj kaj eventuale kun junaj esperantistoj vojaĝantaj tra Svislando, eble tiuj 7 gejunuloj fariĝos veraj geesperantistoj.

Sendu kuraĝigajn mesaĝojn al Maïté Girard, Le Cachot 47, 2405 La Chaux-de-Milieu.

Wil

Esperanto-Klubo Wil

S. POCHANKE, Letenstr. 70, 9500 Wil.
Ø :071 911 68 30.

Venontaj kunvenoj :

Aprilo 7an, 19h30 : Ni legas la revuon *Literatura Foiro* kun Ernst Von May. Tibeta restoracio Gemsli, Kronenstr. 11, Flawil.

Majo 5an, 19h30 : Forumo pri la Esperanta Civito kun Stanislaw Pochanke. Restoracio Blumeneck, Sântisstr. 1, Wil.

Junio 2an, 19h30 : 51a Kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio kun Gertrud Eggenberger. Restoracio Blumeneck, Sântisstr.1, Wil.

Zürich

Esperanto-Societo Zürich

PF 858, 8034 ZÜRICH, Ø :01 25 150 25.
Kunvenoj: 19.15, Akazienstrasse 6, 8008 Zürich.

La 8an de februaro en la klubejo de ESZ kunvenis la estraro kun

kelkaj membroj. La malnova estraro estis reelektita. Sekvis ĝenerala diskuto pri la aktiveco de la societo kaj de ties membroj. La jarkalkulo montriĝis pozitiva je CHF 600. Tial venis la demando, kiel plej efike elspezi tiun monon ?

Esperanto en loka radio

Ekde la ĵaŭdo 11a de marto je la 13h20 esperanto havas lokon en la elsenda programo de la zurika loka Radio Lora. Temas pri momento titolita *Literatura programero en kaj per esperanto*, kiu aŭskulteblas je 97,5 megahercoj. La ĉefa publiko de Radio Lora estas progresema intelektuloj, politike aktivaj homoj kaj eksterlandanoj vivantaj en Zürich mem kaj en ties ĉirkaŭregiono ĝis distanco de 50 km. Tio signifas, ke proksimume du milionoj da homoj povas kapti tiun radio-programon. La elsendon pri esperanto pretigas Jan Stanislaw Skorupski kiel konkludon al la pollingva programo. Eblas aĉeti la surbendigitajn esperanto-elsendojn ĉe la libroservo de Esperanto-Societo Zürich, poŝt-fako 858, 8034 Zürich.

Ŝercis la koboldoj !

Kvankam mi plej atente tajpas la artikolojn de nia revuo kaj ankaŭ

atentegge relegas ilin plurfoje, ĉiam kaŝiĝas eraretoj, pro kiuj kulpas ne mi mem, sed la malicaj koboldoj. Lastnumere en mian nekrologon pri la forpasinta Dante Bertolini, ili dirigis al mi sur la paĝo 31a, *ke sub mia prezido SES elektis lin kiel hororan membron!* Ĉiuj legantoj tuj komprenis mian tiaman intencon honorigan. Tial mi rediras, ke *sub mia prezido SES elektis lin kiel honoran membron.* Kaj bone konante Dante Bertolini, mi scias, ke la ŝerĉo de la koboldoj estus vekinta lian bonhumoron.

Claude Gacond

Libroj

Unu voĉo por la mondo

LAMBERTI Vitaliano : *Una voce per il mondo. Lejzer Zamenhof il creatore dell' Esperanto.* Milano 1991 : Mursia. 8+348 p., kun ekstertekstaj ilustraĵoj.

Jam de kelkaj jaroj emas aperi libroj pri la vivo kaj la misio de L. L. Zamenhof. En la franca aperis verko de Centassi kaj Masson : iom tro propagandema kaj laŭstila agitema. Supozeble ĝin verkis du aŭtoroj, kutimaj al laŭta ĵurnalismo.

Vitaliano Lamberti ne estas ĵurnalisto, sed esperantisto, kiu kapablas verki literature. Li estis inĝeniero kaj alta ŝiparmea oficiro, naskiĝinta en 1923 kaj mortinta en 1990, do antaŭ la apero de tiu ĉi libro. Li verkis ankaŭ sur la literatura kampo. Interalie li aŭtoris unu romanon. Kaj tiu ĉi libro estas fakte historia romano : kun severa dokumenta bazo. Sed la fakto, ke la aŭtoro rekonstruas sentojn, interparolojn, neniam esprimatajn dubojn, ktp, klare indikas, ke sur la bazo de faktoj historie atestataj Lamberti kunteksis la historion de juda familio en la iama rusa imperio. La libro, cetere, aperis en kolekto « Historio kaj dokumentoj (sekcio Biografioj) ».

La aŭtoro skizas al ni tradician bildon pri la vivo de Zamenhof : de la anonco pri « sia misio », tra la studado en Moskvo, al la naskiĝo de la lingvo, al la malfacilaj momentoj, dum kiuj li apenaŭ povis nutri sian familion, ĝis la rikolto, la vojaĝo al Boulogne-sur-Mer, la tiel nomita « Ido-perfido », kaj la revoj pri la postmilita Eŭropo.

Absolute tradicia vidpunkto : supozeble biografio romanigita ne povas eskapi sian forman destinion. Kelkfoje la romana strukturo de la verko estas iom peza. Iom drameca. Eble temas pri sudeŭropa patoso trudita al orient-

eŭropanoj ? Mi ne povas juĝi pri tio, ĉar eble la tiamaj orient-eŭropanoj pli patosis ol la sudaj, kaj cetere certas, ke la pasinta jarcento multkampe estis pli patosa ol la nuna. Tamen, malgraŭ kelkaj « programaj paroladoj » iom tro longaj, la romana strukturo estas inteligenta kaj atentokapta.

La bibliografio estas tradicia, kaj iom magra, sed certe la aŭtoro abunde baziĝis sur la *Leteroj* kaj la *Originala Verkaro*. Min mirigas, ke oni mencias eĉ ne unu verkon de Ludovikito, kaj ke abundas aliaj verkoj biografiaj – do abundas duagrada bibliografio.

Tazio Carlevaro

Biografio di Ido

Tazio Carlevaro kaj Reinhard Haupenthal. Kuneldonita de Hans Dubois kaj Editions Iltis, Bellinzona kaj Saarbrücken, 1999. 193 p.

La enkonduko al tiu impona verko estas publikita sinsekve en la lingvoj franca, germana, itala, esperanta kaj ida. Ĝi tiel objekte raportas pri la historio de la lingvo kaj tiel precize prezentas la celon kaj enhavon de la bibliografio, ke mia recenzo konsistas ĉefe el citaĵoj el tiu ĉi teksto.

Indas unue gratuli ambaŭ aŭtorojn pro ilia persistemo. Ili persistis malgraŭ ĉiuj malfacil-

aĵoj. Tial mi esperas, ke ilia konkluda alvoko al kunlabora kritiko por korekti eventualajn mankojn ricevos pozitivan eĥon fare de la konsultantoj de tiu verko.

Ido estas planlingva projekto, kiu longtempe konkuris kun esperanto. Ĝin grandparte el-laboris Louis Couturat (1868-1914), brila franca filozofo, kun granda intereso pri matematiko kaj logiko. Lia celo estis konstrui lingvon sur la bazo de esperanto, kiu faciligu la laboron de la intelekto. Do li celis lingvon precizan, kun granda semantika analizpovo. Li opiniis, ke tia lingvo devas esti daŭre perfektigebla, laŭ la evoluo de la sciencaj konoj.

En 1901, okaze de Universala Ekspozicio en Paris, Couturat fondis *Delegacion (aŭ Delegation) por la Akceptigo de Internacia Lingvo*. Supozeble, li elpensis tiun elpaŝon surbaze de siaj spertoj dum la Unua Internacia Kongreso de Filozofio, kiu okazis samjare, ankaŭ en Paris. Multaj kolegoj liaj, kaj interesataj sciencistoj esperantistaj, konsentis partopreni. La esperantistoj helpis tiun Delegacion konatiĝi kaj akiri novajn adeptojn, membrojn kaj subtenantojn. La celo estis proponi al la *Internacia Asocio de la Akademioj*, ke ĝi decidu selekton inter la ĝis tiam prezent-

itaj planlingvoj, por ke ekzistu pli-malpli oficiale agnoskita internacia planlingvo. Couturat oficis kiel sekretario de la Delegacio.

Multaj personecoj el la scienco kaj el la politiko partoprenis ĝin. Kaj multaj plej malsamaj organizaĵoj aliĝis al ĝi. Sed en 1907, la kongreso de la Asocio de la Akademioj decidis rifuzi alfronti la demandon, ĉar ĝi konsideris sin nekompetenta.

Tiam la delegacia komitato decidis, ke ĝi mem, sub formo de speciala komisiono, selektos la rekomendotan planlingvon. Ĉiuj opiniis, ke temos pri esperanto, ne nur pro la fakta superrego de la esperanto-parolantoj inter la membroj kaj la subtenantoj de la Delegacio, sed ankaŭ ĉefe pro tio ke inter 1900 kaj 1907 la esperanto-movado ege disvastiĝis, ĉefe en Francio.

Fine de 1907 tiu Komisiono kunvenis en Paris. Ĝi decidis adopti *principe* esperanton, sub la kondiĉo, ke oni enkonduku en ĝin la reformojn, kiujn prezentis iu mistera 'Ido', en broŝureto speciale presita por la okazo, kaj kiun neniu pli frue iam vidis.

Couturat ne kapablis akiri la konsenton de la esperantistoj al sia reform-projekto. Tiom pli ke Louis de Beaufront, la 'advokato' de esperanto antaŭ la Delegacio, poste deklaris sin aŭtoro de tiu reform-projekto.

Ĉirkaŭ tiu projekto naskiĝis movadeto, kiu rapide grandiĝis. La lingvon flegis Akademio, kiu ĝin reformis kaj 'plibonigis' ĝis 1913, kiam ĝi decidis starigi 'periodon de stabileco'. Fakte la ĉiama reformado grave malhelpis la firmiĝon de la ido-movado, kaj ĝi estis ekonomie malavantaĝa, ĉar la lernolibroj kaj la vortaroj tro rapide malnoviĝis, eĉ antaŭ ol ili estis plene forvenditaj.

La kresko de la ido-movado haltis unuamomente en 1914 pro la militeksplodo, kaj pro la subita morto de Couturat pro aŭtomobila akcidento. Post la unua mondmilito la renaskiĝo de ido estis rapida kaj intensa. Sed la diversaj faŝismoj, la dua mondmilito, internaj lingvaj konfliktoj, la naskiĝo de novaj planlingvoj, malhelpis pluan kreskon de ido, kiu, male, ekde la 30aj jaroj konsiderinde reduktiĝis. Nun diras Tazio Carlevaro, restas movadeto, kiu plueldonas sian revuon *Progreso*.

La katalogo de Carlevaro kaj Hauptenthal celas konservi detalan *bibliografian* scion pri la lingvo nomata 'ido', kiu estas la sola projekto (krom esperanto kaj iomete volapük) en kiu, kiel ili diras «parolis ne nur propagandistoj, sed ankaŭ geedzoj kaj familioj mikslingvaj, en kiu kreiĝis interesa originala literaturo, nepre leginda». Ili komencis sian

laboron en 1975, kun la espero atingi la finon en 1978, okaze de la 70jara datreveno de la naskiĝo de ido. Fakte, tiu bibliografio aperas nur nun, okaze de la 90a datreveno. Kiel ili skribis, ili estas homoj laboremaj, sed la taskoj, kiuj absorbis ilin dum tiu 20jara 'malfruo', estis ja multaj. Kaj certe ido-bibliografio ne apartenas al la grupo de iliaj plej urĝaj taskoj, malgraŭ ilia intereso por la planlingva historio.

Ilia verko prezentas unue kronologian liston de la libroj. Sekvas aŭtora listo de la libroj. Tria parto koncernas la libro-kolektojn, kaj fine lasta parto koncernas la periodaĵojn aperintajn en ido.

Ili konscias, ke ilia laboro ne povas esti perfekta, ĉar ili povis nur parte enketi por havi en la manoj vere ĉiujn ekzemplerojn de la menciitaj libroj kaj revuoj. Iuj verkoj menciigis nur tra recenzo aŭ tra artikolo aperinta en periodaĵo. Tion ili specife indikas. La redaktadon gvidis Tazio Carlevaro, dum Reinhard Haupenthal akurate kaj skrupule reviziis la tuton. Li kontribuis cetere nur per la titoloj, kiujn li mem posedas, aŭ kiujn li propraokule vidis. Ili ankaŭ baziĝis sur la tri gravaj bibliografiaj katalogoj de Petro E. Stojan, de la Internacia Esperanto-Muzeo en Wien kaj de Jozefo Takács. Ankaŭ la konsulto de la

kolektoj de CDELI montriĝis utila helpo. Por efektiviĝi sian laboron, ili utiligis komputilan sistemon, kiu faciligos la korektadon de eblaj mankoj. Do utiligontoj ne forgesu atentigi pri tiuj, kiujn ili rimarkos.

Konklude grandan dankon al Tazio Carlevaro kaj Reinhard Haupenthal pro ilia epokfara kontribuo, kiu eble instigos la historiistojn pli serioze interesiĝi pri la naskiĝo, disvolviĝo kaj nuna endormiĝo de la ido-komunumo. CDELI provas kolekti ĉion, kio ankoraŭ de tempo al tempo aperas en tiu lingvo de la Delegacio, kaj ni povas esti certaj, ke Tazio Carlevaro tre atente daŭrigos la katalogadon de tiu ĉi materialo.

Aĉetemuloj direktu sian mendon al Tazio Carlevaro, Viale G. Motta 32, 6500 Bellinzona.

Claude Gacond

Cxu Esperanto postvivos la jaron 2045 ?

Por sia prelego kadre de la SES-labor-kunveno de la 6a de marto, Tazio Carlevaro pretigis 55paĝan dokumenton titolitan *Cxu Esperanto postvivos la jaron 2045 ?* Kiel raportas Andy Künzli pri tiu aranĝo, Tazio Carlevaro kvazaŭ distanciĝis el sia aparteno al la esperanto-mondo. Tiucele li paroligis Hans Dubois, sian kaŝ-

noman duoblulon, kiun li ĝenerale aktivigas por eldonaj aktivecoj.

Laŭ mi lia eseo, kiu fakte ne konkludas, ĉu esperanto ankoraŭ ekzistos dum la centjariĝo de Tazio Carlevaro, prave atentigas nin, ke ni tendencas vivi en mondo, kiu rapide evoluas, sen rimarki la koncernajn ŝanĝojn, eĉ ne la lingvajn.

Kiel li diras, la angla atingis 'kritikan mason', kaj ĉio okazis sen speciala premo fare de Anglio aŭ Usono. Tio venas simple de la cirkonstancoj. En la precizaj sciencoj (de matematiko al medicino) la angla graviĝis sekve al la dua mond-milito. Multaj eŭropanoj migris al Usono, kaj komencis verki kaj publikigi ne plu germane aŭ itale, sed angle. La mondo-milito detruis Eŭropon kaj nur 50 jarojn poste oni travivas la realajn lingvajn konsekvencojn. La sola lando, kiu restis integra ankaŭ en scienca kampo, estis Usono. Tien migris multaj sciencistoj, ankaŭ dank'al malavara politiko de monhelpoj, kaj al favoriga leĝo, kiu permesis plulerni dumlabore, en la periodo de 2-3 jaroj, medicinon, fizikon, kemion, matematikon, zoologion, psikologion, ktp. La scienca Eŭropo tiel angliĝis, ĉar la revenintoj rapide ricevis gravajn postenojn, kaj enkondukis teknikojn, metodologiojn kaj lingvon lernitajn en Usono mem.

Plej gravaj periodaĵoj sciencaj estas nun anglalingvaj. Ankaŭ en Eŭropo ili aperas angle, ĉefe se ili celas al publikigo de sciencaj malkovroj. Apud tio, tekniko kaj ekonomio angliĝis, kaj la premo de la gepatroj al la edukaj instancoj instrui la anglan fariĝis tre grava. Ĉiuj ĉi faktoroj kontribuis al la eksplodo de speco de bezono por la angla, kiu efikis kiel neĝbulo. La disvastiĝo de la angla ekfunkcias per si mem, sen plua aktiva favorigo.

Hans Dubois konstatas, ke esperanto kontraŭe fariĝis kvazaŭ neutila en la monda praktiko, ĉar ĝia komunika potencialo estas preskaŭ nula. Esperanto ĉefe disvastiĝis en esperantistaj diskutkluboj. Kaj ĝi emas resti en tiuj medioj, kiuj dividiĝas inter skribreformistoj, finvenkistoj, raŭm-istoj, ktp, anstataŭ alfronti la realajn realaĵojn.

Koncerne tiun lastan ismon mi legis kun plezuro tiun ĉi meditigan kritikon de Hans Dubois : *Raŭmismo estas speco de identiĝo kun la kerno de la komunaj valoroj de ĉiuj esperantistoj, kiuj volas ilin vivi, senkonsidere pri la malatingo de la prceloj. Mi nenion pluan skribos pri raŭmismo, ĉar, se mi pri ĝi miscitas eĉ unusolan virgulon, oni asertos ke mi « komprenis nenion pri la tuta demando ».*

Tiu eseo de Carlevaro-Dubois vigle startigas debaton pri nia ĝenerala sinteno. Tion ni povis konstati en Bern. Tial mi kuraĝigas niajn esperanto-rondojn atente tralegi ĝin kaj poste ekzameni, kiel ili povus mem malfermiĝi al nova informstrategio pli konforma al la realaj aspiroj propraj al la esperantismo, ol daŭre provi demonstri la ne-taŭgecon de la angla, kiel mondolingo.

La lasta konkluda frazo de Hans Dubois meditigu nin pri la statuso de esperanto en la hodiaŭa mondo: *Ni devas insisti pri niaj valoroj. Montriĝis, ke la spiritaj valoroj de Esperantio iom post iom estis aktualigitaj de la cetera mondo. Iusence, ni antaŭsentas mondon, kiu tamen konstruiĝos, kvankam sen ni. Ni estis speco de avangardo. Eble ni restos tia.*

Ni ĝoju, ke pluraj el niaj esperoj al unueca mondo iom post iom realiĝas eĉ sen esperanto, kaj ni partoprenu en tiu mondanisma evoluo kultivante la originalajn latentajn, kiuj emas resti kaŝitaj en nia esperanta mondeto. Ili esprimiĝis plurfoje tre originale. Sed ĉu ni mem reale konscias pri tio.

Por akiri tiun ĉi eseon oni rekte sendu mendon al Tazio Carlevaro.

Claude Gacond

Antoine Théophile Cart 1855-1931

Journée commémorative du 30 juillet 1998. Saint Antoine de Breuilh – Dordogne. 12 p.

Laŭ la *Enciklopedio de Esperanto* Théophile Cart estis franco. Sed en Svislando oni scias, ke li estis ankaŭ svisa civitano. La broŝuro, kiun eldonis en la franca kaj esperanto la urbeto Saint Antoine de Breuilh okaze de Memoriga Tago je lia honoro, ankaŭ pravas tion.

Ĝi liveras al ni biografieton de Antoine Théophile Cart naskita la 31an de marto en Saint Antoine en la loĝejo de sia 26-jara patro Jacques-Louis Cart, kiu estis protestanta pastoro. La patrino Adrienne Louise Sophie Wilhelmine Masset ankaŭ estis 26-jara.

Jacques-Louis Cart forlasis en 1853 la kantonon Vaud por deĵori en Dordogne serve al evangelia libera eklezio, kiu rifuzis dependi de la ŝtato. Tiu protestanta komunumo, kiu prenis sur sin ĉiujn ekleziajn elspezojn, ne toleris, ke la ŝtato salajru la pastorojn kaj ke tiuj ĉi surmetu robon dum la diservoj.

Dum sia restado en Dordogne la patro de Théophile Cart aŭtoris la malferman predikon de la 5a sinodo de la Unio de la Evangeliaj Eklezioj de Francio okazinta en

1856 en Clairac, kaj du librojn, kies titoloj estas : 'Des principes de l'Eglise libre' kaj 'La famille et l'Ecole'.

Fakte li ne restis longe en Francio. Jam en 1859 ni retrovas lin en Lausanne, kaj tial Antoine Théophile kaj liaj 4 gefratoj frekventis la elementan kaj dua-gradan lernejojn en tiu urbo. La familio Cart poste instaligis en Basel kaj estas tie, ke Théophile eniris la universitaton. Siajn superajn studojn li daŭrigis en Berlin, Roma, Paris kaj Upsala. Li fariĝis unue lektoro pri la franca en Upsala (1891-1892) antaŭ ol instrui la germanan kaj lingvistikon en Paris, unue en la lernejo L'Ecole Alsacienne, poste en la liceoj Henri IV (1892-1921) kaj Sainte Barbe kaj ekde 1893 ĝis sia morto en 1931 kiel profesoro en la altlernejo Ecole des Sciences Politiques. Théophile Cart vivis en Svislando nur fericele.

Estos eble la tasko de nia historiisto Andy Künzli ankaŭ rememorigi lian poresperantan aktivecon en Svislando. Interalie li estis unu el la fondintoj de Svisa Esperanto-Societo en 1902-1903 kaj unu el la inspirintoj de Edmond Privat. Ankaŭ organiziĝu foje Memoriga Tago en Svislando honore al tiu grava svisa esperantisto.

Claude Gacond

Muziko

Jan Stanislaw Skorupski kantas poemojn de Edmond Privat kaj siajn proprajn

Ĝus aperis kompakta disko aĉet-ebla kontraŭ Euroj 20 aŭ CHF 32 ĉe editio L, Postfach 133, 8025 Zürich. Ø 1 262 28 34.

En tiu poezia sonalbumo troviĝas poemoj eldonitaj antaŭe en diversaj publikaĵoj: Poemoj el *Tra l' Silento* de Edmond Privat estis surbendigitaj en Berlin per Studio 88 en 1989 kaj eldonitaj siatempe kasede de la pola firmao Sztuka Polska. Estas okaze de partopreno en vintroferiado organizita de KCE en La Chaux-de-Fonds en 1988, ke Jan Stanislaw Skorupski ekmelodiigis ilin. Aliaj kantaĵoj estas eltiritaj el la verko *Tempo*, libro kun kalendara ciklo de 732 sonetoj. La soneto *Potem*, kiu anagramas la sonetaron *Tempo* estis surbendigitita en la studio de Martin Velt en Adliswil en 1999. Sub la titolo *Diversaĵoj* sekvas poemoj verkitaj por aŭ pro okazaĵoj, en kiuj partoprenis Jan Stanislaw Skorupski. Ili jam troviĝis en la kasedo *Tra l' Silento*.

Kvankam temas do pri reprodukto de registraĵoj por kasedaj, la nuna eldono digitalig-

P.P.

CH-2305

La Chaux-de-Fonds 5

ita estas kvalite tre bona. Kaj aŭskultante tiun diskon oni ĝuas pri la perfekte komprenebla oratorado de Jan Stanislaw Skorupski. Li fakte pli oratoras, ol reale kantas, kaj lin akompanas ciganaj pianistoj kaj violonistoj ludantaj per muzikiloj duonagorditaj. Rezultas iom kurioza folklor-eca sinsekvo kanzona, kiu impresas monotone, se oni senhalte aŭskultas la diskon kiel unu tuton. Tial konsilindas ne konsideri tiun diskon kiel unu tuton, sed kiel aron da deklamaĵoj aŭskultindaj individuue por si mem en taŭge elektitaj momentoj. Tiam reliefigas ilia originaleco kaj la oratora talento de la poeto kaj kantisto Jan Stanislaw Skorupski.

Claude Gacond

Esperantista Renkontiĝo En Sunhejmo

Hans Kästli, Brendenstrasse 11
CH-9424 Rheineck ☎ 071 888 00 98

Sabaton 8an de majo 99

08.00 : Alveno de la helpemuloj.

09.00 : Alveno de la aliĝintoj.

10.00 : Spektado de la 1a parto de la vidbendo *Esperes-desperes* enkondukita de Sonja Brun kaj diskuto pri la filmo.

12.00 : Tagmanĝo en la restoracio de la stacidomo de Walzenhausen.

14.30 : Spektado de 2a parto de la vidbendo *Esperes-desperes* kaj diskuto pri la filmo.

16.30 : Vespermanĝeto en Sunhejmo.

17.00 : Oficiala fermo.

Eblas tranokti en Sunhejmo.

Aliĝu skribe aŭ telefone !